



35-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkredo 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

In formoj: ... <http://users.belgacom.net/EBG>; ebg.skynetblogs.be; xurb.leadhoster.com; esperanto.net; lernu.net; uea.org; liberafolio.org; eo.eventeo.net; sites.google.com/site/ebgaktuala; sites.google.com/site/panb2001

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Czesław Baranowski pri gramatikaj Konsiloj
- Paĝo 3 - Printempa Promenado kaj 3a Mezorienta Kunveno
- Paĝo 4 - Jacob Hasbun kun Araba Noveleto 13
- Paĝo 5 - Alberto Garcia, Raymundo Sousa, Miša Bronštejn, Poemaro
- Paĝo 6 - Hazama, Tahira, Kozyra, kaj aliaj pri Esperantaj Eventoj
- Paĝo 8 - Afonso Soares pri Rozalia kaj Marko Zamenhof
- Paĝo 11 - Osmo Buller pri UEA membronombro
- Paĝo 12 - Anna Löwenstein pri PV kaj PIV
- Paĝo 17 - Remy Sproelants raportas konferencon en EP

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Aprilo 2010

- 7 Semajna kunveno (*post-paska semajno*)
- 14 Bernard-Regis Larue pri kial Plutono ne plu estas planedo (17 malferma tago CO)
- 21 Kostiantyn Demianenko pri Ukrainaj sturgoj kaj aliaj Azovaj fiŝoj
- 28 Hélène Falk-Bracke proponas ludon kun proverboj de Aktuala Aprilo

Majo 2010

- 5 Semajna kunveno
- 12 Hélène Falk-Bracke tradukvesperas "Espéranto de A à Z" de André Cherpillod
- 19 Semajna kunveno
- 26 Bernard-Regis Larue pri sur la vosto de kometoj

Junio 2010

- 2 Semajna kunveno
- 9 Semajna kunveno
- 16 Semajna kunveno
- 23 Bernard-Regis Larue pri ĉu la ĉielo falos sur niajn kapojn
- 30 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

GRAMATIKAJ KONSILOJ
Prefiksoj MAL kaj MIS

1. MAL - estas prefikso montranta ideon logike kontraŭan al tiu, kiun montras la radiko (mallonga, malplena, malutila, malakcepti, malamiko). Ĝi estas plej ofte uzata ĉe la vortoj kun **eca**, **kvalita** aŭ **granda** signifo, ŝanĝigante la signifon de ĉiu vorto al la rekta kontraŭo: malbona, malgranda, malfeliĉa, malriĉa, malgrasa (=havanta malmulte da graso), malsana, malfrua, mallaborema, malagrabla, malproksima, malmorala.

2. MAL - estas uzebla ankaŭ ĉe agaj, poziciaj, direktaj kaj aliaj abstraktaj vortoj: fermi- **malfermi**, helpi- **malhelpi**, laŭdi- **mallaŭdi**, aliĝi- **malaliĝi**, ŝlosi- **malŝlosi**, ŝtopi- **malŝtopi**, ami- **malami**, sukcesi- **malsukcesi**, supre- **malsupre**, antaŭen- **malantaŭen**, konkordo- **malkonkordo**, ktp.

3. MAL - estas uzebla ankaŭ ĉe iaj vortoj kun konkreta signifo, por kiuj ekzistas rekta kontraŭo: **amiko** (=persono, al kiu oni sentas simpatian aŭ amon), **malamiko** (=persono, al kiu oni sentas malsimpatian, malamon).

4. Oni povas iafoje heziti inter mal kaj ne. **Ne** montras foreston aŭ mankon de io, dum **mal** montras ĉeeston de la kontraŭa ideo. Ĝi estas iafoje uzata kiel pli forta **ne**. **Ekz.:** **laŭdi** (=diri, kiel bona io estas); **ne laŭdi** (=ne diri, kiel bona io estas); **mallaŭdi** (=diri kiel malbona io estas); **ne mallaŭdi** (=ne diri, kiel malbona io estas); **utila** (tia, ke ĝi kreas bonon aŭ profiton); **malutila** (tia, ke ĝi kreas malbonon aŭ malprofiton); **ne malutila** (tia, ke ĝi ne kreas malbonon aŭ malprofiton); **amiko** (=persono, al kiu oni sentas simpatian aŭ amon); **neamiko** (=persono, al kiu oni ne sentas ion specialan); **malamiko** (=persono, al kiu oni sentas malsimpatian, malamon).

Rimarkoj:

a) Rekte kontraŭa signifo ne ĉiam esprimiĝas per **mal**. Ekzistas ne tre multaj kontraŭaj vortpartoj sen la prefikso **mal**. **Ekz.:** tago - nokto; nigra - blanka; vera -

falsa; trovi - perdi; oriento - okcidento; komenci - fini; memori - forgesi; nordo - sudo; sur - sub; kun - sen; al - de; jes - ne;

b) Por multaj **mal**-vortoj oni kreas nekunmetitan alternativon, kiu ankaŭ meritas nian atenton. Mi donas al vi nur kelkajn ekzemplojn de **mal**-alternativoj, kiuj estas ofte uzataj de esperantistoj: **trista** (=malgaja, malĝoja); **kurta** (mallonga); **frida** (=malvarma); **liva** (=maldekstra); **liven** (=maldekstren); **leĝera** (=malpeza); **olda** (=maljuna); **lanta** (=malrapida); **dura** (=malmola).

5. MAL - povas ankaŭ esti ordinara radiko: **malo** (=rekte kontraŭa ideo). La **malo** de "granda" estas "malgranda", **male** (=tute kontraŭe). Se oni neniam uzas **MAL**, estas dubinde, ĉu oni entute parolas Esperanton. Memoru tamen, ke estas diferenco inter **mal** (kiu komplete ŝanĝas la signifon en la kontraŭon) kaj **mis**, kiu ne ŝanĝas la bazan signifon de la vorto, tamen atentigas, ke la ago estas erare aŭ malĝuste farata. **Ekz.:** **laŭdi** (=diri, kiel bona io estas); **mallaŭdi** (=diri kiel malbona io estas); **mislaŭdi** (=erare diri, ke io estas bona, dum ĝi fakte estas malbona); **mismallaŭdi** (=erare diri, ke io estas malbona, dum ĝi fakte estas bona). Ni devas memori ankaŭ, ke la prefikso **mis** (oficialigita en la 1929 jaro) montras ĉiam manieron aŭ econ de tio, kio staras poste.

Jen kelkaj ekzemploj:

Kalkuli - **miskalkuli** (=kalkuli erare); kompreni - **miskompreni** (=kompreni erare); skribi - **misskribi** (=skribi erare); korekti - **miskorekti** (=provi korekti kaŭzante nur malkorektecon); paŝi - **mispaŝi** (=fari eraran paŝon); uzi - **misuzi** (=uzi en malbona aŭ malĝusta maniero); fari - **misfari** (=malbona fari); formo - **misformo** (=erara, malbona formo).

Ni devas ankoraŭ memori, ke: **misa** signifas erara, malbona, malĝusta, **misi** signifas erari, maltrafi, **mise** signifas malkonvene, malbone.

[Czesław Baranowski](#) - [Mielno](#), [Koszalin](#), [Pollando](#)

PRINTEPOPROMENADO

Karaj gesamideanoj: Jen invitulo por nia ĉi-jara printempa promenado, la 8 an de majo 2010. Ĉi foje ni havos specialan promenadon sur la malnova fervojo de Molinee per speciala fervoja biciklo. La vojo entute estas 8 kilometrojn longa. Komprenoble kun paŭzo. Ni kune forveturos aŭtomobile je la 13a horo sur la parkejo Grijpenparking malantaŭ la stacidomo de Tienen. La ekskurso komenciĝos apud la Warnant kie ni ne nur promenos sed ankaŭ manĝetos kaj trinketos. Se vi volas partopreni tion sciigu al Stein Printempopromenado @ sel-belgio.be aŭ (0484/086.012) antaŭe. Kostoj: 5,00 Eŭrojn (promenado + manĝetoj) pagebla sur 979-0871657-20 de SEL-Belgio, Rue des Rêches 20, 5530 Godinne kun nomo kaj nombro da personoj. Ni jam antaŭgigas pri via partopreno. Ĝis! Stein @ sel-belgio.be ; <http://www.sel-belgio.be> ; gsm: +32 (484) 086 012. <http://xurb.freehostia.com/509/> ; SEL Skolta Esperanto Ligo Belgio,

Stein Hautekees, *presidanto*

PRI 3-A MEZORIENTA KUNVENO kaj 1-a Turka (Junulara) Kongreso

Ju pli oriente des pli bone! La turka, kiel Esperanto, estas aglutina lingvo (pardonu: 'kunmeta' en mia dialekto!), kaj la nomo de la urbo Eskiŝehiro estas kunmetita de la du pecetoj "malnov-" kaj "urb-". Malgraŭ la nomo, tamen, la urbo estas tre moderna universitata urbo pli proksima al Ankaro ol al Istanbul. Do, pli oriente ol la pasintjara kunven-urbo Iznik. Tien kunvenis multegaj turkoj, multaj eŭropanoj kaj unu israelano por la 3-a Mezorienta Kunveno. La kunveno okazis de la 2-a ĝis la 5-a de aprilo 2010. Estis prelegoj. Unu estis de Ben Indestege pri vojaĝado tra Egiptujo, Sudano kaj Etiopujo. Se vi ne aŭskultis ĝin, vi ne scias, ke via televido trompas vin pri la stato de la lando Sudano, almenaŭ en ĝia norda parto. La dua prelego estis de Mireille Grosjean pri la agado de UEA en la kunveno de Unuiĝintaj Nacioj en Genevo

3
kun abundaj ekzemploj, kiuj donis al la partoprenantoj la senton esti mem en la granda salono de UN. Tamen tre sukcesaj estis la programeroj bazitaj sur ĝeneralaj diskutoj, en kiuj tre aktive povis partopreni ankaŭ la turkaj junaj esperantistoj ĉeestantaj. Anna Löwenstein organizis la diskutojn. Tre kongrue kun la lando unu el al diskutoj estis pri la leĝoj pli kaj pli oftaj en Eŭropo pri malpermesoj porti la islaman vualon. La rezulto de la diskuto ne estis unueca, ĉar la motivoj malantaŭ tiuj leĝoj ne estas klaraj kaj ofte tute ne temas pri klopodo liberigi virinojn sed pri klopodoj perforti la islamanojn al tuja eŭropeco.

La kunveno estis unusence ankaŭ la unua tutturka kunveno de esperantistoj, ĉar krom la homoj el Istanbul komencis aperi homoj el aliaj turkaj urboj, kiuj lernis Esperanton per la reto (La kurso de Esperanto de Carlos Pereira en la turka versio ŝajnas esti la preferata). La junaj turkoj, cetere, estas la rezulto de la kursoj de Murat Ozdizdar kaj de Teresa Kapista, kiu ĉiujare venas antaŭ la Mezorienta Kunveno por instrui dum 15 tagoj en liceo en Istanbul.

Ne povis manki la vesperaj programoj, kies ĉefa ero estis la prezento de scenoj el la rakontoj pri Nasredin Hoĝa, kiu vivis en ĉi tiu regiono, kaj kies famo nun iras de balkanaj landoj al Ĉinujo, kiu donis al ni libretojn en Esperanto.

Se mi devus resumi la aferon per unu frazo, mi dirus, ke la Komisiono pri Agado en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko ne sukcesis en ĉi tiu kunveno enplekti multajn arablingvanojn, sed certe ĉi-jare starigis la fondaĵon por la rekreo de la Turka Esperanto-Asocio.

Por la venonta jaro la plano antaŭvidas kunvenon en du partoj, unu el ili devus okazi en la oriento de la oriento, en Irano en insuleto en la araba/persa golfo kaj unu en la okcidento de la regiono, en Tunizio, por tiuj, kiuj ne povos iri al la alia. Vi scias, ke la Meza Oriento estas la lando ne nur de la mil kaj unu noktoj sed ankaŭ de la mil kaj unu problemoj por ricevi vizojn.


Renato Corsetti

4

Araba Noveleto 13 (7a-13a jarcentoj)

Venis ĝis miaj oreloj diro pri Al-Mansuro, laŭ kio li restadis ĉe unu el la turetoj de sia urbo, kiam li ekvidis malkvietan homon vagantan en la stratoj. Li sendis alkondukigi lin al si. Li demandis lin pri sia farto. La homo rakontis al li, ke li estis foririnta komerci, kaj akiris monon; ke reveninte, li estis konfidinta la monon, kiun li kunportis, al sia edzino; ke sia edzino informis lin, ke la mono estis ŝtelita ĉe ŝi; ke li tie ne rimarkis boraĵon nek spurojn de grimrado. Tiam diris al li Al-Mansuro: « De kiel longe vi edziĝis kun ŝi? » Li respondis: « De unu jaro. » Li diris lin: « Ĉu ŝi estis virga kiam vi edziĝis kun ŝi? » Li respondis: « Ne. » Li diris lin: « Ĉu ŝi havas filon de aliulo? » Li respondis: « Ne. » Li diris lin: « Ĉu ŝi junas aŭ maljunas? » Li respondis: « Ŝi estas eĉ tre juna. » Al-Mansuro alportigis flakonon kun parfumo aparte elektita por li, strange akraodora, kaj transdonis ĝin al li, dirante: « Plaĉigu vin per ĉi parfumo, ĝi elpelos el vi viajn zorgojn. » Kaj kiam la homo foriris de ĉe Al-Mansuro, ĉi tiu diris al kvar el siaj intimuloj: « Iru al la pordegoj de la urbo kaj restu po unu atentemaj apud ĉiu el ili. Kiu ajn preterpaŝos vin odoranta tiun parfumon – kaj li flarigis ĝin al ili - tiun alkonduku al mi! » Reveninte sian hejmon, la homo transdonis la parfumon, kiun li kunportis, al sia edzino, dirante: « Ĝin donacis al mi la Komandoro de la kredantoj (Tradicia kroma titolo donita al la ĥalifato [kalifo])! » Flarinte ĝin, ŝi sendis venigi sian amanton, al kiu ŝi estis doninta la monon, kaj diris lin: « Parfumigu per ĉi parfumo, kiun donacis al mia edzo la Komandoro de la kredantoj. » Parfumiĝinte, li poste trapasis unun el la urbaj pordegoj. La tiea gardisto odoris la atendatan parfumon sur li, kaptis lin kaj alkondukis lin al Al-Mansuro. Al-Mansuro demandis lin: « Kie

vi akiris ĉi tiun parfumon? Ĝiaodoro estas stranga kaj ĉarma. » Li respondis: « Mi aĉetis ĝin. » Li diris lin: « Konigu al ni disde kiu vi aĉetis ĝin. » La homo balbutis kelkajn konfuzaĵojn. Al-Mansuro vokis sian policedron kaj diris lin: « Kunprenu tiun homon. Se li alportas tiajn-tiajn dinarojn, lasu lin foriri laŭplaĉe; se li rifuzas fari tion, rekte donu al li mil vipobatojn, sen kroma permeso mia. » Post kiam la homo eliris el ĉe li, Al-Mansuro revenigis la policedron kaj diris al li: « Horigu kaj nudigu lin, sed tute ne aŭdacu vipi lin antaŭ ol vi konsultos min pri tio. » La policedro eliris. Post kiam li malliberigis kaj nudigis lin, la timigita homo konsentis restitui la dinarojn, kiujn li tuj poste efektive reportis. Al-Mansuro estis sciigita pri tio. Li vokis la proprulon de la dinaroj kaj diris lin: « Kion vi disponus se mi redonus al vi viajn perditajn dinarojn? Ĉu mi estos juĝanto de via edzino? » Li diris: « Jes. » Li diris lin: « Jen viaj dinaroj, kaj mi ĵus deklaris vian eksedziĝon kun tiu virino. » Kaj li rakontis al li la freŝajn eventojn.



Jacob Hasbun, membro de EBG, tradukis

FABLO

{Medito en la florigardeno de Regina}

Staris la velkita floro
en la aŭtuna ĝardeno,
apud la ruĝa baseno
spegulo de la aŭroro.
En la akvo ruĝkoloro
-pro l'naskitaj sunradioj-
spekuliĝis la folioj,
kiel rubenoj el lumoj,
inter mateniĝaj brumoj
de kromataj simfonioj.

Revis la floro velkinta
sentante, ke estis vero
tiu momentefemero,
ke ĝi ne estis ŝrumpinta!

Rapide kiel la vento
la mateniĝo disiĝis;
kaj la ĉielo, transformiĝis
en helblua firmamento.
Pro sunradia torento,
kaj mistera dia ago,
estis klara lumo-tago,
kaj sur la akvo trankvila
speguliĝis la sunbrila
en la diafama lago.

Rigardis sin la velkinta
floro, sur l' akva spegulo;
en l'supraĵo sen makulo,
ĝi estis agoniinta.

Sunbriligis densa brumo
la matenon sunradian
kaj la floron agonian.
Kiel blovado el fumo
malaperis la sunlumo.
Sur la spegulo-lageto
jam ne estas l'silueto
de la kompatinda floro;
fandiĝas kiel vaporo
ĝi, en l'ĝardeno-lageto.

Estas relativa ĉio
en la spegulo fascina;
ĉio dependas, Regina,
de l'kolor-lumo de Dio.

En la spegulo de Dio,
spekuliĝas kun obstino
nia fatala destino:
ĉio estas fantazio
ĝis alveni al nenio!

Sole ni estas reflektaj
imagoj de la selektaj
kreoj de la Diaj donoj,
kaj de la Diaj ordonoj:
pecoj de siaj projektoj!
Moralajo: ĉio rolas
en la universa sceno,
kiel en l'spegul-baseno,
tian kiel Dio, volas.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

IZOLECO (al iu Luiza)

Mi ne estas marmoro!
Mi estas granito!
Mi ne plibeligas templojn
aŭ palacojn.
Mi estas pavimo de stratoj
Sur kiu ĉiuj piediras.

Neniu aŭdas mian kanton
nek mian krimon
de angoro, malĝojo aŭ ĉagreno
transformitaj en krudajn
aŭ glatajn ŝtonojn.
Malgraŭ ke mi restas
meze de la homamaso,
mi estas en plena izoleco.

Raymundo Souza, Brazilo

KURSANINOJ

Kiom ĉarmaj estas miaj kursaninoj -
koro svenas!
Dek estuntaj esperantistinoj
gaje venas

por kvivito, ĉirpo, pepo drola,
gaja rido
ĉe l' hazarda miso elparola -
en rapido.

Mi aŭskultas ilin; la vizaĝ' barboza
penas montri sin severa, serioza -
vana peno!

Kaj grimacas
mi nevole jam sen brido -

eble venos nun en nia gaja rido
la kompreno...

Miĝa Bronŝtein (Bruna Ŝtono) 13.09.2004
Tihvin, S.Petroburgo, Rusujo

5

6

RETLETERE EL JAPANIO

Por kiu deziras esperantumi en Japanio,
Japana Esperanto-Instituto sendas al vi
novaĵojn: "Kongresoj kaj Seminarioj
okazontaj en 2010 en Japanio"

Kunloĝado de Esperanto-Ligo Kantoo

Datoj: **de la 17a ĝis 18a de aprilo**

Loko: Esperanto-domo Yatugatake (Hokuto-si)

http://eo.wikipedia.org/wiki/esperanto-domo_de_Yatugatake

Aliĝo: hori-zonto @ water.sanneto.ne.jp

La 23a Verda Lernejo

Datoj: **de la 1a ĝis la 5a de majo**

Loko: Nagano-ken

Informoj: esperanto@thn.ne.jp

La 43a Esperanto-Seminario

Datoj: **de la 2a ĝis la 4a de majo**

Loko: Tiba-si

Aliĝo: esperanto@jei.or.jp : Japana Esperanto-Instituto

La 84a Kongreso en Kiuŝu

Datoj: **de la 8a ĝis la 9a de majo**

Loko: Kitakyusyu-si

Aliĝo: sed.kibe@com.home.ne.jp

La 59a Kongreso en Tokaj

Datoj: **de la 22a ĝis la 23a de majo**

Loko: Aiti-ken

Aliĝo: yamadapiano@mac.com

La 59a Kongreso en Kantoo

Datoj: **de la 5a ĝis la 6a de junio**

Loko: Tokio

Aliĝo: hori-zonto@water.sannet.ne.jp

La 58a E-Kongreso en Kansajo

Datoj: **de la 5a ĝis la 6a de junio**

Loko: Nara-si

Aliĝo: nararondo@gmail.com

La 74a Hokkajda E-Kongreso

Datoj: **de la 2a ĝis la 3a de oktobro**

Loko: Sapporo-si

La 97a Japana Esperanto-Kongreso

Datoj: **de la 9a ĝis la 11a de oktobro**

Loko: naqasaki Brick Hall (Nagasaki-si)

(Tel : 095-842-2002) ; Kongrestemo:

Esperanto ŝanĝas la mondon, ankaŭ vin!

Infomoj: <http://esperanto.jp/jek10n/eo.html>

Aliĝo: jek10n@jei.or.jp

La 51a Tohoku-Kongreso de Esperanto

datoj: **de la 6a ĝis la 7a de novembro**

Loko: Morioka-si

La 11a E-Kongreso Ĉugoku kaj Ŝikoku

datoj: **de la 6a ĝis la 7a de novembro**

Loko: Higasikagawa-si

Aliĝo: kosaka_kiyoyuki@hotmail.com

Internacia Fako de Japana Esperanto-Instituto

<http://www.jei.or.jp/hp/esp.htm>

HAZAMA Hiroto kaj TAHIRA Masako, 16/03/2010

ESPERANTAJ EVENTOJ

SPITE LA CINDRAN NUBON

Pli ol 70 partoprenantoj vizitis la 32-an
Malferman Tagon de la Centra Oficejo de
UEA sabaton, la 17-an de aprilo. Multaj
estis malhelpitaj pro nuligitaj flugoj aŭ
fortimigitaj de plenplenaj trajnoj sekve de
la haltigo de aertrafiko pro la cindra nubo
elspuita de islanda vulkano. La ĉefgasto
estis d-ro Mark Fettes, asista profesoro pri
edukado en la Universitato Simon Fraser
en Vankuvero. Fettes prelegis dufoje pri
Esperanto kaj la monda eduka problemoj,
klarigante sian ideon pri UEA kiel
unuavice eduka organizaĵo. Nora Caragea
legis el "Pacakontoj", kiu estas jam la
kvara libro de la germana autorino Gudrun
Pausewang en ŝia traduko. Rob Keetlaer
prezentis sian retejon pri proverboj,
proverbaro punkto net. Sian agadon
prezentis ankaŭ TEJO kaj
Esperanto@Interreto (E@I), dum
komitatano Johan Derks diskutigis
interesitojn pri la utilo de reta decidfarado.
Ankaŭ pluraj filmoj estis montritaj. La
Libroservo vendis sume por 2107,52. La
ĉefa furoraĵo (8 ekz.) estis la nova
"English-Esperanto-English Dictionary" de
John Wells. De "Asteriks ĉe la olimpiaj
ludoj" kaj la Tonkin-festlibro "La arto labori
kune" estis venditaj po 6 ekz. La venonta
Malferma Tago estos sabaton, la 27-an de
novembro 2010.

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 375 2010-04-20

RAPORTO DE KOZYRA

La 4-an de marto 2010 la vicprezidanto de
Pola Sejmo (la malsupera ĉambro de la
pola parlamento) Jerzy Szmajdziński
akceptis en la Parlamentejo
geesperantistojn: d-rino habil. Ilona
Koutny, Francisko Witucki, Eduardo
Kozyra, Kazimiro Krzyak kaj Mariano
Zdankowski. La vicprezidanton akompanis
deputito de Pola Sejmo, Leszek
Aleksandrak. La geesperantistoj
prezentis al la vicprezidanto la deziron, ke

Esperanto ricevu statuson de lingvo, samranga kiel la aliaj fremdaj lingvoj en la pola edukad-sistemo. La parlamentanoj kun bonvolemo sugestis, ke la E-grupo proponu al la ministro pri edukado komenci proceduron por la realigo de la prezentita celo. Ili samtempe deklaris apogi la iniciativon. La renkontiĝo pasis en amika etoso kaj finiĝis per komuna foto.

Eduardo KOZYRA, Malbork, Pollando



Maldekstre dekstren: Eduardo Kozyra, Kazimiro Krzyak, Vicprezidanto de Pola Sejmo Jerzy Szmajdziński, Ilona Koutny, Mariano Zdankowski, Francisko Witucki

ILONA KOUTNY VIZITIS EBG



Ilona Koutny kaj Michael Farris vizitis EBG la 24an Marto 2010



Ilona Koutny prelegis en EBG pri interlingvistiko



Françoise Pelegrin instruis E-on en EBG la 24an Marto 2010

EBG-ANOJ EN MEZORIENTO



3a Mezorienta E-Kunveno 1-5 Aprilo 2010



Eskişehir estis la urbo de la 3a Mezorienta E-Kunveno

MALFERMA TAGO DE UEA



Okazis sabate la 17an de Aprilo en la C.O. de Roterdamo

DEMIANENKO PRELEGIS EN EBG



Demianenko el Ukrainujo prelegis la 21an de Aprilo

EBG kunfunnebras kaj esprimas sinceran kondolencon al samideanoj polaj pro perdo de 97 personecoj dum la tragika aviadila falo de la 10an de aprilo apud urbo Smolensko, Rusujo.

ROZALIA KAJ MARKO La gepatroj de Zamenhof

Turni nian atenton, eĉ se supraĵe, al la homoj, kiuj ĉirkaŭigis Ludovikon Lazaron Zamenhof per gepatraj zorgoj, estas aliri fonton de netaksebla graveco por pli klara kompreno pri la direktoj, kiujn Zamenhof donis al sia vivo, pri liaj infanaj revoj, pri la noblaj trajtoj de lia karaktero, pri liaj plenkreskulaj aspiroj Marko kaj Rozalia ili estis nomataj. Marko — aŭ Samenhof Mordeĥaj Markus — pro tiama subeco de Pollando al la Rusa Imperio, devis adopti la rusforman nomon Marko Fabianoviĉ Zamenhof. Li devenis de juda familio el urbo Tykocin, en rusa Pollando, kie li naskiĝis en la 27-a de Januaro 1837. Lia patro, tio estas, la avo de Zamenhof — Fajvel-Fabian Zamenhof — fariĝis adepto de filozofia movado klerismo, kies konceptoj emigis progresemajn judojn al aspiroj asimiliĝaj, al rompo de la fermiteco de sia vivo en interna, ekskluzive juda mondo, aparte de la ekstera, kaj al aspiroj al moderna klereco. Ĉi tie — por pli klara kompreno de la influo de tiu filozofia movado — mi helpas min per la bonega biografia verko *La Kaŝita Vivo de Zamenhof*, de N. Z. Maimon:

Tiu klerismo estis flanka branĉo de la ĝenerala klerisma movado en Francujo ("la philosophie des lumières") kaj Germanujo ("die Aufklärung"), kaj, same kiel ĝi, bazita sur humanismaj ideoj. Ĝi celis liberigi la homojn de mezepokaj superstiĉoj, de religiaj kaj sociaj katenoj. Ĝiaj adeptoj forte batalis kontraŭ la tradiciaj, apartigantaj vivaranĝoj de la judoj. Ĝin iniciatis Moseo Mendelssohn en Germanujo fine de la 18-a jarcento, sed en la judajn kvartalojn de orienta Eŭropo ĝi pli malfrue enpenetris, sub la hebrea nomo "Haskala". La amasoj forĵetis ĝin; ĝi tamen allogis junulojn, turnante iliajn korojn for de la malvastaj

religiaj konceptoj al sekulara scio, al moderna klereco, al kulturaj interrilatoj kun la ekstera mondo. Inter tiuj, kiuj adoptis la klerismon, troviĝis ankaŭ la familio Zamenhof. Sian kulminon atingis tiu movado en la 60-aj jaroj, dum la iom libera periodo de Aleksandro la Dua. Tio koincidis kun la junaĝaj jaroj de Ludoviko, kaj la klerismaj ideoj estis ĉefa faktoro en la formiĝo de lia mondkoncepto. Libera spirito, kosmopolita tendenco regis en la gepatra hejmo, ĉe la kleristoj de Bjalistoko. En tiu atmosfero la juna Ludoviko kreskis kaj edukiĝis. "Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj" (Originala Verkaro, p. 418). Ĉi tiu spirito gvidis lin en la daŭro de lia tuta vivo. Ĝi — kune kun la neamikaj rilatoj inter la loĝantaro de la urbo — inspiris lin revii pri unuiĝo de la homaro kaj krei por tiu celo la komune-homan, internacian lingvon.

Tiu klerismo ne same manifestiĝis en la landoj, kie ĝi disvastiĝis: en la regiono, kie vivis la Zamenhofoj, ĝi vekis ĉe la judoj aspirojn al funda klereco, al studado de aliaj lingvoj, kaj iagrade al renovigo de la propra, hebrea lingvo. En Bjalistoko, Fajvel-Fabian, la patro de Marko, avo de Ludoviko, fariĝis pioniro de la klerisma movado, kaj sub la inspiro de ties idealoj fondis kurson de la hebrea kaj germana lingvoj. Memkompreneble, plej fervora disĉiplo de tiu klerisma pioniro en Bjalistoko estis lia filo Marko, por kiu klereco, plej funda klereco, montriĝis kiel nepre atingenda celo, krom ankaŭ studado de aliaj lingvoj cele al kulturaj interrilatoj kun la ekstera mondo. Marko fondis judan lernejon, kie li instruadis la francan kaj la germanan, kiujn li lernis aŭtodidakte. Ankoraŭ 21-jara, do en 1858, li edziĝis al 18-jara Rozalia Sofer — Liba Rosalia Sofer — klera kaj sentema filino de komercisto. Ili havis 5 filojn kaj 4

filinojn, el kiuj Ludoviko estis la plej aĝa. Post li naskiĝis Sara, Fania, Aŭgusta, Felikso, Henriko, Leono, Aleksando kaj Ida. Ĉi tie ni transdonas la parolon al Gaston Waringhien, kiu pri Marko jenon skribas en sia eseo *1887 kaj la sekvoj...* :

(...) la ambicio de la patro celis pli alte: li difinis al si oficialan karieron, kiun li atingis, malgraŭ la peza baro de sia judeco, dank'al sia fera volo, pedagogia talento kaj plena lojaleco al la rusa registaro. Publikiginte kurson de geografio, li estis akceptita kiel instruisto pri geografio kaj modernaj lingvoj en meza ŝtatlernejo. Sed aspirante al pli vasta agokampo, en Decembro 1873 li transloĝiĝis en Varsovion, tiam ĉefurbon de la "Pola Reĝlando", kaj li sukcesis nomiĝi instruisto por la germana lingvo en la tiea "Reala Gimnazio" (aliaj dokumentoj precizigas "Veterinara Lernejo"). Li kronis tiun promocion, atingante en 1882 la oficon de regna cenzuristo super la hebreaĵ eldonaĵoj kaj gazeto en Varsovio, kaj, kiel regna funkciisto, la rajton porti uniformon kun la spado. Li estis pedanta homo, skrupulema, severmora kaj tre ŝparema; krom siaj oficialaj okupoj li trovis la tempon gvidi la studojn de kelkaj lernantoj, kiujn li pensionis, kaj verki plurajn lernolibrojn pri la germana kaj la rusa. Siajn naŭ infanojn li edukis kun altacela zorgo: el la kvar filoj, tri fariĝis doktoroj medicinaj kaj unu farmacia — preskaŭ la solaj intelektaj karieroj, krom la juro, malfermataj al la ruslandaj Judoj.

Bildo, kiu plej karakterizis la personecon de Marko, ja estas CERBO. Neniel revema li estis, konstante severa, rigorema, pedanta, laborema, kio facile kompreneblas, se oni konsideras, ke li nepre devis kontraŭpezi sian judecon per kompensaj intelekta elstareco kaj ege senriproĉa konduto en la socio kaj en la hejmo. Bildo karakterizanta Rozalian

nepre estas KORO, kiel prave atentigis Edmond Privat en sia *Vivo de Zamenhof*.

De la patrino la koro, de la patro la cerbo, de la loko la impresoj: jen tri ĉefaj elementoj en la formado de la Zamenhofa genio.

Marjorie Boulton, en sia bonega verko *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto*, simile, sed iom pli vaste atestas:

La paro, kies unuiĝo donis al la homaro Lazaron Ludovikon Zamenhof, ŝajnis strange malkongrua, kvankam la troveblaj atestaĵoj ĝenerale indikas, ke la geedzoj kunvivis harmonie kaj feliĉe. Marko Zamenhof ŝajnis esti tute intelekto, racio, laboremo kaj malvarmo; Rozalia Zamenhof, naskite Sofer, ŝajnis, male, amo, sentemo, sindediĉo, kompatato kaj karitato, vere patrineca pacienco kaj intuicia komprenemo.



Prozaj okazaĵoj povas pli bone reliefigi la trajtojn distingigajn de ambaŭ kaj montri la psikologie riĉajn elementojn, kiuj donis konsiston al la neordinara personeco de la kreinto de Esperanto, senŝanĝe markita per sincera, esenca bona konduto. Unu el la punoj uzataj de Marko por edukado de la filoj estis ekzilo en unu ĉambron de la domo, sen rajto al manĝo. Dum la ceteraj familianoj manĝis, Rozalia sendis al la infano la servistino Maria kun manĝaĵoj kaj dolĉa averto: *Sed Panjo diras, ke tio ĉi devas esti la lasta fojo.* Kaj kiam la infano, post puno, eliris el la punejo, Rozalia troviĝis ekstere. Montriĝis tiam, ke kisoj, pli ol puno, helpis la infanojn al bona konduto. Laŭ Privat tiaj patraj rimedoj

aplikiĝis nur al la petolemaj gefratoj de Ludoviko, kies bona konduto ja estis denaska, pro kio li estis respektata de la tuta familio. Al ambaŭ Ludoviko oferis kulton de fila amo, sed la patrino li ja adoradis kvazaŭ dian anĝelinon. Rozalia estis konstante malsana, kaj Ludoviko flegadis ŝin kun pleja, kortuŝa, ama zorgo. Privat asertis, ke por Rozalia en la tuta mondo ekzistis neniu pli bona ol la amata Ludoviko. Kaj oni povas plene kredi, ke, krom aliaj kaŭzoj transcendaĵ, superteraj, propraj al tiu eksterordinara animo, kia estis Ludoviko, Rozalia ankaŭ forte kontribuis por la idealisma karaktero de la Majstro. Ŝi faris lin idealisto kaj fidis lian spiritan grandecon kun espero konstanta. Ŝi lin edukis laŭ la kredo, ke ĉiuj homoj estas fratoj kaj egalaj antaŭ Dio. Sed oni estu justaj kaj rekonu, ke Marko ankaŭ same forte kontribuis por la formado de la nobla karaktero de Ludoviko. Marko, laŭ Privat, lin revokadis al realo, for de l' revoj. Tio klarigas la brilgrandiozan lumon de lia genio, pro kiu, en lia kreaĵo, kuniĝis idealismo, sento, arto kaj logiko. Dum en la koro de Rozalia nestis entuziasma, fidoplena aprobo kaj apogo al la lingvo-etikaj idealoj de Ludoviko, en la animo de la patro kreskis zorgoj pri la destino de la filo en medio senŝanĝe antaŭjuĝema al judoj. Kiam, en la fino de la jaro 1879, Ludoviko devis prepariĝi al la universitataj studoj, Marko, malgraŭ la bonegaj atestaĵoj de la Gimnazio pri la bona konduto, diligenteco kaj sukceso de Ludoviko, preferis aŭskulti stultajn diagnozojn de amatora psikologo, kiu lin konvinkis pri la danĝero de la filaj revoj pri ia lingvo internacia. Tiajn revojn li rigardis kiel fiksan ideon, kaj ili certe malutilis lian kuracistan karieron. Antaŭ ol Ludoviko vojaĝis al Moskvo, Marko ordonis, ke li tute forlasu la aferon ĝis sia reveno. Ludoviko konsentis kaj konfide donis al li siajn kajerojn pri la lingvo, ĉiujn manuskriptojn, certa, ke la patro ilin

konservos kaj ke li povos iam repreni sian laboron. Sed Marko ne plenumis sian promeson: bruligis ĉion. Laŭ Marjorie Boulton, tio detruis ĉe Ludoviko la patran aŭtoritaton, kio signifis, ke li de tiam liberiĝis de ĉia ajn kompromiso kontraŭa al siaj revoj, ke li povos sin tute fordoni al klopodoj por tiajn revojn realigi. Nenia sento malnobla tamen anstataŭis sian filan amon, kion pruvos decido de Ludoviko, per kiu Marko ankoraŭfoje spertis la dolĉan efikon de la fila sento. En la fino de 1888, Marko sin turnas al la filo, kun peto pri helpo kontraŭ grava embaraso. Pezis sur Marko gravega akuzo, ke li, kiel cenzuristo, permesis publikigon de ofenda aludo al la caro. Li estis jam perdinta sian cenzuristan postenon kaj verŝajne povos esti trafita de eksigo el la instruista posteno, devigita al pago de peza monsumo kaj eble kondamnita al karcero en Siberio. La senprava, maljusta akuzo originis ĉe la ĉefa rusa cenzuristo en Sankta Petersburgo, homo tre malbonreputacia, kiu de longe enviis la alte moralajn kaj profesiajn kvalitojn de Marko. Marko permesis publikigon de artikolo pri vino en gazeto nomata *Hacefira*. La aŭtoro, iu D-ro Frenkel, interalie konsilis al modereco en vino trinkado pro memevidentaj malutiloj de ekscesaj dozoj. Tio sola sufiĉis por elĉenigi la malicon de la ĉefcenzuristo kontraŭ Marko. La sola savo de la patro de Zamenhof troviĝis en kapitulaco antaŭ la malnoblaĵ postuloj de tiu koruptiĝema cenzuristo: pago de alta monsumo — 5.000 rubloj — per kio Marko restus ĉe sia instruista posteno. Estis Ludoviko, kiu liveris al li la monon, ĝuste tiu monsumo, kiu al li restis el la doto de Klara, lia edzino. Marko, malgraŭ sia iama suspektema, tre rigora sinteno rilate al la revoj kaj idealoj de Ludoviko, tamen poste multe helpis lin ĉe aferoj kun la cenzuro. Lia eksigo el tiu ofico alportis al Ludoviko multajn malhelpojn ĉe traktado kun la

cenzur-instancoj. Marko verkis legolibrojn kaj lernolibrojn, pri lingvoj kaj pri geografio. En 1905, li sin donis al kompilado de proverboj kaj starigis paralelojn inter tiuj manifestiĝoj de la popola saĝo en diversaj lingvoj. En 1906, aperis du aliaj kajeroj de tiu kolekto kun promeso de Marko pri aperigo, en venonta 4^a kajero, de proverboj en la hebrea, greka, latina kaj esperanta. Ĝi neniam aperis, sed, en 1910, Hachette, la granda franca eldonejo, publikigis la *Proverbaron*, de Ludoviko. Marko do, en la fino de sia vivo, ankoraŭ pli simpatie rilatis al la idealoj de la filo. Ni pri tio aŭskultu rimarkojn de Marjorie Boulton:

Oni kredas, ke la patro mem petis la kunlaboradon de Ludoviko, kaj ke tiu komuna intereso iom plisimpatigis patron kaj filon reciproke. La maljuna, soleca pedantulo sentis veran plezuron, kaj montris sin pli feliĉa ol dum longa tempo, kiam la germana firmao Möller kaj Borel oficiale mendis de li kelkcent ekzemplerojn de lia Proverbaro. Jen, lia granda laboro ne estis vana; eksterlande oni ŝatis ĝin. Li neniam sciis, ke Ludoviko skribis al Möller kaj Borel kaj sendis al ili la monon, por ke ili faru tiun ĝojigan mendon. Nur du jarojn post la morto de Ludoviko, la frato Felikso, en biografia skizo, malkaŝis la sekreton!

Marko forpasis en 1907. Ambaŭ — Marko kaj Rozalia — forte kontribuis por la formado de la nobla karaktero de la iniciatinto de esperanto, ĉiu laŭ siaj personecaj apartaĵoj. La rezulto estis animo brilega, en kiu genie harmoniis la plej bonaj kvalitoj de la gepatroj: *disciplino, logikemo, racio*, el Marko; *sentemo, dolĉeco, karitato*, el Rozalia.

Afonso Soares, Rio de Janeiro, Brazilo
INKO, prelego en KKE, Januaro 2009

Libroj konsultitaj:

Vivo de Zamenhof - Edmond Privat
Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto - Marjorie Boulton
La Kaŝita Vivo de Zamenhof - N. Z. Maimon
Enciklopedio de Esperanto - Hungara E-Asocio/1979

UEA MEMBRONOMBRO

En la jaro 2009 Universala Esperanto-Asocio havis 5713 individuajn membrojn (IM), dum en 2008 ilia nombro estis 5702. La pluso de 11 signifas, ke pasintjare la ofta "kongresa efiko" apenaŭ influis la totalan nombron, kio ne mirigas, ĉar la UK-oj en 2008 kaj 2009 estis praktike same grandaj (resp. 1845 kaj 1860 aliĝintoj). La gastiganto en 2008, Nederlando, pli-malpli konservis la membraron de 2008. En la gastiganta lando de 2009, Pollando, la nombro pli ol duobliĝis. La polan kreskon kontraŭpezis tamen malkresko en kelkaj najbaraj landoj, kiujn Bjalistoko ial ne altiris tiom kiom la pli multekosta Roterdamo. La plej granda falo estis en Rusio.

Ankaŭ en 2009 plej multe da individuaj membroj estis en Francio (611; +28), dum Germanio estis la dua (539; +5), tiel ke 20,1% de la membroj loĝis en tiuj du landoj. Sekvis Japanio (402; ±0), Brazilo (381; +44), Usono (302; -12), Nederlando (248; -6), Pollando (245; +125), Italio (195; -13), Rusio (165; -44), Belgio (155; -4), Britio (146; -7), Svedio (141; -13), Hispanio (138; -9), Finnlando (131; -5), Ĉinio (115; -12), Ĉeĥio (101; +19), Hungario (98; -15), Danio (97; ±0), Svislando (86; +1), Kanado (72; -3), kaj Israelo (65; -1).

La nombro de aliĝitaj membroj (AM), t.e. tiuj membroj de la landaj asocioj de UEA, kiuj ne estas IM de UEA, kreskis al 12605 (+113). Plej multe da aliĝitaj membroj estis en Hungario 1570 (+222), Ĉinio 1051 (±0), Japanio 948 (+271), Germanio 806 (-26), Italio 741 (-36), Pollando 700 (+200), Usono 504 (+163), Belgio 443 (-37), Francio 418 (-135), Britio 350 (-15), Svedio 320 (+25), Kroatio 295 (+2), Korea Resp. 219 (+33), Nederlando 219 (+7), Brazilo 204 (-114), kaj Finnlando 203 (+1).

La tuta membraro de UEA, t.e. aliĝitaj kaj individuaj membroj kune, nombris 18318 (+124). En la statistiko de ĉiuj membroj en 2009 suverene regis Hungario (1668; +207), sekvata de Japanio (1350; +271), Germanio (1345; -21), Ĉinio (1166; -14), kaj Francio (1029; -107). La nombro de landoj kun membroj de UEA kreskis de 121 al 124. 436 IM (7,6%) estis malpli ol 30-jaraj kaj sekve ili samtempe estis IM de TEJO. Kompare kun la antaŭa jaro temis pri malkresko de 32. El ĉiuj IM junaj estis 7,6%. (Dek jarojn pli frue, en 1999, la proporcio estis 9,7%). El ĉiuj AM, junaj estis 1905 (-21). La junaj IM kaj AM sume nombris 2341. En 2008 tiu nombro estis 2394, tiel ke la malkresko de la tuta TEJO-membraro estis 53.

La revuo "Esperanto" havis 3765 pagitajn abonojn (-95) kaj la junulara revuo "Kontakto" 735 (-110). Laŭlanda membrostatisiko de UEA aperas en la aprila numero de "Esperanto".

Osmo Buller, Gazetaraj Komunikoj n° 371, 2010-03-24

PV KAJ PIV

Eĉ la kovriloj de vortaro povas kaŝi - nu, se ne precize krimon, almenaŭ sufiĉe dubindan manipulado. Unue mi prezentos la du atestaĵojn.

La unua estas Plena Vortaro, kiun ni kutime nomas PV. Ĝia dua, definitiva, eldono aperis en 1934. La ĉefredaktoro estis Grosjean-Maupin. Li havis plurajn kunlaborantojn, el kiuj unu estis Gaston Waringhien, tiam supozeble sufiĉe juna. Dum multaj jaroj PV estas la ĉefa, kaj plej aŭtoritata, Esperanto-vortaro.

La dua estas Plena Ilustrita Vortaro, kiun ni ĉiuj konas per la karesnomo PIV. Ĝi aperis en 1970, kiam la plejmulto el la kunlaborintoj de la pli frua vortaro jam mortis. Restis nur Waringhien, kiu fariĝis la ĉefredaktoro.

En interesa enkonduko al PIV, Waringhien priskribas la historion de la du vortaroj. Li permesas al si kritiki la laboron de sia antaŭulo, klarigante kiel Grosjean-Maupin traktis la multajn ekzemplodonajn citaĵojn, kiuj troviĝis en PV: "... la plej taŭga rimedo estis la citado de ekzemploj, kiuj estu klaraj, mallongaj kaj aŭtoritataj; kiam tiuj tri ecoj ne akordiĝis, Grosjean-Maupin ne hezitis mallongigi aŭ simpligi malĉefajn frazopartojn, markante tamen la ekzemplon per la signo de la aŭtoro, de kiu ni ĝin pruntis, tiel ke ofte estis plene aŭtenta nur la ekzemplodona parto de al frazo." (p. IX). Li poste klarigas (p. XIV), ke redaktante PIV, li penis reĝustigi tiujn kripligitajn citaĵojn. Tamen, kiel mi volas montri per ĉi tiu prelego, ankaŭ Waringhien mem ne estas ĉiam absolute neriproĉinda.

PIV: NE NUR KRITIKINDA

Antaŭ ol daŭrigi, tamen, mi volas atentigi, ke mi certe ne konsideras PIV nur kritikinda. Ĝi estas ege utila verko, precipe pro la amaso da citaĵoj kiuj garnas ĝin, donante ekzemplojn pri la uzo de la kapvortoj. Utilaj estas ankaŭ la transsendoj al aliaj vortoj kun simila signifo, kiuj ege helpas se oni serĉas sinonimojn. Kiel verkisto, mi konsultas PIV konstante.

Tio ne signifas, ke ĉio en PIV estas uzinda. Multaj homoj kredas, ke se vorto aperas en PIV, tio donas al ĝi kvazaŭ oficialan rangon. Fakte, PIV estas speco de ĝenerala rubujo, en kiun oni ĵetis ĉion, kion oni trovis, ĉu ĝusta, ĉu erara, ĉu uzinda aŭ ne. Krome, ĝi estas tre francocentra. Vidu, ekzemple, la difinon de la

nomo Vieno: (Grava noto: Ĉiuj difinoj citataj en ĉi tiu teksto estas mallongigitaj por montri nur la interesan parton. Por vidi la plenan difinon, konsultu la koncernen vortaron.) Nomo de: 1 franca rivero; 2 franca urbo; 3 la ĉefurbo de Austrio.

FUNDAMENTAJ KAJ OFICILAJ RADIKOJ

Atentante pri tiu averto, oni tamen povas utiligi PIV, kiu mem donas abundajn indikojn, kiuj ebligas taksu, ĉu vorto estas uzinda aŭ ne. Fundamentaj radikoj, ekzemple, estas indikitaj per steleto. La Fundamento konsistas el tri partoj: la 16 Reguloj, la Ekzercaro, kaj la Universala Vortaro, kiu aperis en la jaro 1893 aŭ 4. (Pri la preciza dato ekzistas kelkaj duboj.)

La Universala Vortaro aperis en la fino de la pasinta jarcento. Estas klare, ke post tiu dato, multaj vortoj aldoniĝis al la Esperanta vortprovizo. Antaŭ la apero de PIV en 1970, la Akademio eldonis sep Oficialajn Aldonojn al la Universala Vortaro. Vortoj, kiuj aperas en unu el tiuj Oficialaj Aldonoj, estas indikitaj en PIV per malgranda cifero 1 ĝis 7 post la koncerna radiko. Do, se vorto en PIV havas aŭ la steleton aŭ la etan ciferon, vi scias, ke ĝi estas fundamenta aŭ oficialigita.

Aliaj vortoj estas sekvataj de aliaj signoj. Kelkaj havas hebrean literon, kiu montras, ke ili estas uzataj en poezio, do ne rekomendataj por normala uzo. Aliaj estas sekvataj de la simbolo N en eta cirklo. Tiuj estas neologismoj. Ĉu uzi ilin aŭ ne, estas afero de persona gusto.

Post la apero de PIV aperis unu plia Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. La vortoj listigitaj en la Oka Oficiala Aldono evidente ne povis havi tiun indikon en PIV. La Oka Aldono enhavas plurajn tre necesajn vortojn, ekzemple cirklo, ekrano, helikoptero, kamiono, mapo, plasto kaj multajn aliajn. Do se vi volas scii pri la oficialeco de vorto, foje ne sufiĉas kontroli en PIV; necesas rigardi ankaŭ la Okan Oficialan Aldonon, kiu aperis en la libreto Aktoj de la Akademio: II. 1968-1974.

Mi devas mencii la fakton, ke ne ĉiuj vortoj oficialigitaj de la Akademio ŝajnas al mi absolute rekomendindaj; ekzemple, kial oni oficialigis en la Tria Aldono la vorton tragika, kiam jam ekzistis la Fundamenta tragedia? Interese, la Akademio mem foje maloficialigis

jam oficialigita vorton. La vorto koncentra estis unue oficialigita kun la signifo samcentra (ekz. koncentraj cirkloj). En la Oka Aldono oni tamen remaloficialigis tiun signifon, kaj donis al la vorto koncentri anstataŭe la signifon "dense kunigi en iun lokon" (ekz. koncentri likvaĵon, koncentri siajn pensojn ktp.)

Estas notinde ke multaj tre utilaj kaj oftaj vortoj ankoraŭ ne ricevis oficialan aprobon, ekzemple tribo, mesaĝo, persvadi, kaj ankaŭ la tre ofte uzata vorto etoso. Krome, multaj vortoj rilataj al seksaj kaj aliaj tabuaj temoj neniam estis oficialigitaj. Inter tiuj estas peniso (kvankam la vorto mammo estas eĉ Fundamenta), pisi, feki, masturbi, menstrui. Ĉiuj estas vortoj, kiujn ni ĉiuj bonege konas, kaj certe sufiĉe ofte uzas en la ĉiutaga lingvo.

ŜATI

Sed nun ni venu al la difinoj mem. Unue mi volas paroli pri la vorto ŝati. Se oni rigardas en PIV, oni trovas ke fakte oni ne devus uzi la vorton tiel ofte kiel ni emas. La difinoj estas jenaj: 1 Rigardi ion kiel valoran, gravan. 2 Havi altan opinion pri iu.

Sed tiam sekvas du rimarkoj: Rim. 1 Oni amas ĉion, kio plaĉas al la spirito, koro aŭ sensoj; oni ŝatas tion, kies valoron oni opinias granda; ekz: kiel kuracisto mi ŝatas la gadoleon, sed persone ĝin mi tute ne amas. Rim. 2 Pro nacilingvaj kutimoj, multaj uzas ŝati anst. ami, kiam la objekto ne estas personomo, ekz.: ŝati kafon, sukeron, danci. Tia uzo, kvankam ofta, estas kontraŭa al la Zamenhofa difino kaj uzado, kaj krome ne kongruas kun la senco de malŝati.

Kiam mi ankoraŭ ne bone konis Esperanton, mi iam havis instruiston, kiu pro la rimarkoj en PIV insistis, ke oni ne rajtas uzi la vorton ŝati, kaj devas en la plej multaj kazoj uzi ami. Sed kiam mi ekaktivis en la movado, mi malkovris, ke malgraŭ PIV, ĉiuj tamen uzas ŝati laŭ la malrekomendita maniero. Do, finfine mi mem ekuzis ĝin tiel, kvankam kun iom malkomforta sento ke mi ne devus.

Nur lastatempe mi hazarde rigardis en PV, kaj vidis tie la difinojn kaj ekzemplojn. La unua difino estas pli-malpli sama kiel tiuj en PIV. Sed aŭskultu la duan, kaj atentigu precipe la ekzemplojn: 2 Volonte uzi ion, fari ion: ŝati kafon, sukeron; ŝati la legadon; ĉu vi ŝatas danci?

13
Do oni vidas ke la uzo de la vorto ŝati en tiu senco estas tre malnova; efektive ĝi havas historion de almenaŭ 60 jaroj. La provo de Waringhien diri en PIV ke ĝi ne estas uzinda estis tute ne sukcesa; fakte li ne povis ŝanĝi jam longe firmiĝintan uzadon. La rimarko en PIV havas bazon nur en lia persona opinio, ĉar ĝi ne respegulas la efektivan uzadon.

Cetere, oni rimarkas ke lia provo anstataŭigi ŝati per la vorto ami estas francismo. En la franca, oni ja diras, "Mi amas kafon", sed en la plejmulto da lingvoj, oni sentas la bezonon distingi inter la du konceptoj ami kaj ŝati.

RAZENO; GAZONO

Nun mi volas diskuti la vorton razeno. La difino en PV estas jena: Ĝardeno flegata herbotapiŝo; herbetaro, herbetejo.

Sed se oni rigardas en PIV, kion oni trovas? razeno (evitinda) = gazono. La difino efektive aperas sub gazono, kie troviĝas ankaŭ la kunmetaĵoj gazonteniso kaj gazontondilo.

Oni vidas, do, ke Waringhien decidis ke ial razeno ne estas taŭga vorto. Li ne nur transsendas al alia kapvorto gazono, sed eĉ avertas ke razeno estas "evitinda". Tian averton li ne aldonas ĉe pluraj aliaj multe pli dubindaj vortoj. Ŝajnas, ke li ne nur malŝatas la vorton razeno; li praktike provas mortigi ĝin. Sed kial? Kial li tiel forte reagis kontraŭ tiu vorto, ke li eĉ volas detrui ĝin?

La respondon ni trovas en la franca vortaro. Gazono devenas de la franca vorto gazon. Razeno, aliflanke, devenas de la germana: Rasen. Se ni konsideras la fakton, ke razeno jam aperis en PV, male kiel gazono, certe oni ne povas pravigi la provon de Waringhien forigi ĝin.

STRANDO; PLAĜO

Iom similan kazon, ni trovas ĉe la vortoj strando kaj plaĝo. Ĉi-foje ambaŭ aperas en PV. La difinoj estas jenaj: strando. Sablobordo taŭga por banado; plaĝo. plaĝo = strando. Oni vidas, do, ke strando estas konsiderata la baza termino, dum ĉe plaĝo oni simple resendas al strando. Ĉe PIV, aliflanke, estas tute la mala situacio. La difinoj troviĝas sub plaĝo, dum ĉe strando oni trovas simple: strando = plaĝo 1. Oni vidas, ke Waringhien ŝanĝis la relativan gravecon de la du vortoj, tiel ke la difinoj nun troviĝas sub plaĝo anstataŭ sub strando kiel en PV. Kaj kial el la du, Waringhien preferas la vorton plaĝo? Tre

14
simple: denove la respondo troviĝas en la franca vortaro. La franca vorto estas plage, dum la germana estas Strand.

Mi devas konfesi, ke loĝante en Italujo, mi mem emas uzi la vorton plaĝo, ĉar tio pli similas la italan spiaggia. Sed ĉi-somere gastis ĉe ni hungara knabo, kiu tute ne konis tiun vorton; li konis nur la vorton strando. Ankaŭ dum la UK en Montpellier, mi rimarkis ke la junulara programo inkluzivis eron kiu nomiĝis, laŭ mia memoro, "Stranda vizito". Do evidente la vorto strando vivas kaj bone fartas, malgraŭ PIV.

KONSIDERI; RIGARDI

La posta vorto estas konsideri. La unuaj du difinoj en PIV estas jenaj: 1 Atente esplori ĉiuflanke en la spirito. 2 Zorge atenti ion, kiel motivon decidigan por agi aŭ kiel alprenindan decidon. Laŭ tiuj du difinoj, la vorto signifas ĉefe "pripensadi". Sed pli interesas min la tria difino: 3 Rigardi 6 (ne Zamenhofa uzo): mi konsideras lin kiel amikon. Per la averto "ne Zamenhofa uzo" kaj la transsendo al rigardi, Waringhien praktike malrekomendas la vorton en tiu senco, kiu tamen estas tre disvastiĝinta. Laŭ li, oni devus uzi rigardi, kaj sub tiu kapvorto (difino 6) oni trovas jenajn ekzemplojn: mi tiam mem rigardis min kiel frenezulon; liaj bofiloj rigardis lin kiel ŝercanton; ili rigardas sin kiel plej kompetentajn en la afero; ktp. ktp.

Sed la fakto estas, ke mi persone kaj certe multaj aliaj esperantistoj regule uzas konsideri laŭ tiu malrekomendita senco. Se ni rigardas en PV, ni trovas, ke tiu uzo tamen delonge ekzistas: 3 Atribui al iu aŭ io ian econ; rigardi kiel; opinii, taksi: ŝi konsideradas tiun ĉi ringon kiel ringon de fianĉigo; oni ne povos konsideri neekzistantaj tiujn faktojn; ktp. La unua el tiuj ekzemploj, cetere, estas sekvata de malgranda K, montrante ke ĝi aperis en Fundamenta Krestomatia. Do, eĉ se Zamenhof ne mem uzis konsideri laŭ tiu maniero, li certe ne opiniis ĝin nerekomendinda.

PROCEDO; PROCESO; PROCEZO

Grupo de vortoj, kies simila aspekto kaj interkruĉigantaj signifoj kreas grandan konfuzon en Esperanto estas procedo, proceso, procezo. Laŭ PV, proceso jam havas du tre malsamajn signifojn: 1 Juĝafero jure submetita al tribunalo. 2 Natura sinsekvo de

fenomenoj disvolviĝanta sen ago de ekstera forto kaj konsiderata en sia tuteco, en sia iompostioma progresado kaj en siaj rezultoj; procezo. Efektive, el la tri vortoj, nur proceso estas Fundamenta, do supozeble tiu konfuzo fontas el la Universala Vortaro mem. Sed la aldono de la aliaj du vortoj tute ne simpligas la situacion. Certe, ĉi tiu estas kazo kie Waringhien estus povinta utile interveni. Tamen li aperigas la PV-ajn difinojn preskaŭ senŝanĝe. La sola grava ŝanĝo, kiun li faris, estas ŝanĝi la esprimon "konsiderata en sia tuteco" (vidu difinon 2 supre), al "rigardata en sia tuteco".

FIBULO; FIBOLO

La venonta diskutenda vorto estas fibulo. Laŭ PV, ĝi havas du tre malsamajn signifojn: 1 Prahistoria aŭ antikva broĉo. 2 Arkforma fermebla pinglo kun ŝirmita pinto. 3 Osto troviĝanta kontraŭ la tibio, ĉe la malantaŭa parto de la kruro.

Se oni rigardas en PIV, tamen, oni trovas nur unu el tiuj difinoj: Longa osto inter genuo kaj maleolo, malpli dika ol la tibio (fibula). Do, kio okazis al la broĉo aŭ pinglo? Respondon oni devas serĉi sub la kapvorto fibolo: 1 Prahistoria aŭ antikva agrafo aŭ buko. 2 = sendanĝera pinglo. Evidente ne plaĉis al Waringhien la fakto ke fibulo havas du tiel malsamajn signifojn, do li kreis novan vorton fibolo kaj rezervis la vorton fibulo nur por la anatomia senco. Tamen, la vorto fibulo eĉ nun estas ankoraŭ uzata laŭ la signifo donita en PV. Ĉu eblas pravigi lian decidon fari tiun ŝanĝon, kiu ne spegulas la efektivan uzadon? Cetere, se oni rigardas sub la kapvortoj broĉo kaj pinglo, oni trovas transsendojn ne al fibolo sed al fibulo! Ŝajnas, ke eĉ Waringhien mem ne estis tre konvinkita pri tiu nova vorto fibolo.

VENERA; VENEREA

Similan intervenon li faris ĉe la vorto venera. Propraj nomoj ne aperas en PV, kaj tiu vorto troviĝas nur por la malsano, komunikebla per amorado. Tiu uzo, cetere, estas Zamenhofa. En PIV, aliflanke Venera aŭ Venero aperas kiel la nomo de la romia diino, dum por la malsano aperas nova vorto: venera.

AKNO

Sama afero okazas denove ĉe la vorto akno, kvankam ĉi tiu estas kazo kie oni eble povus agnoski, ke Waringhien pravas. Laŭ PV, akno havas du malsamajn signifojn: 1 Malsaneca

ruĝa ŝvelaĵeto sur la haŭto. 2 Haŭtmalsano karakterizata per ruĝaj ŝvelaĵetoj. Tamen, tiu duobla signifo povus konduki al miskompreno. Se oni diras, ekzemple, "Mia filo havas aknon sur la vizaĝo", ĉu oni volas diri, ke li havas unu aknon aŭ amason da ili?

En PIV, Waringhien evitas tiun problemon, uzante la vorton akno nur en la unua senco, kaj kreante novan vorton akneo por la haŭtmalsano. Ĉi tiu do estas kazo, kie oni povas pravigi la intervenon de Waringhien, kvankam mi persone estus preferinta pli fundamentisman solvon kiel ekzemple aknaro.

GAJNI; LUKRI

Alia ekzemplo, kie vorto en PV havas pli vastan gamon da signifoj ol en PIV, okazas ĉe la vorto gajni. Laŭ PV, ĝi havas du signifojn: 1 Akiri ion bonan per sia penado: gajni monon, premion, batalon, sperton, salajron la vivrimedojn, sian vivopanon ktp. 2 Akiri ion bonan per favoro de la sorto: gajni en loterio, en kartludo ktp.

PIV fakte donas tutan serion de malsamaj difinoj, ĉiuj pli-malpli similaj kiel tiuj en PV, sed mi volas aparte menci nur la sesan: 6 (evitinda) Perlabori. Kaj estas transsendo al lukri. Tiu vorto tute ne troviĝas en PV, sed laŭ PIV ĝi signifas: Akiri (monon) per sia laboro: li lukras po tri dolarojn en semajno; kiom vi lukras?; li estas la lukranto de la tuta familio. Persone en ĉiu el tiuj frazoj, mi uzus gajni, kaj tiu uzo kongruas kun la ekzemploj en PV, kvankam PIV karakterizas ĝin kiel "evitinda". Cetere, la vorto lukri en PIV estas signata per eta N en cirklo, alivorte ĝi estas neologismo.

PLUSKVAMPERFEKTO

Laste, mi volas diskuti la vorton pluskvamperfekto. Aŭskultu la difinon laŭ PV, kaj aparte atentu la ekzemplon: Verba tempo, montranta agon pasintan kaj antaŭan al alia pasinta ago: kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe estis dirinta al mi la veron (Z). Sed aŭskultu la difinon laŭ PIV: verba tempo en kelkaj lingvoj, montranta agon pasintan kaj antaŭan al alia pasinta ago; la pluskvamperfekto ne ekzistas en Esperanto, kiu esprimas ĝin per simpla aŭ perfekta preterito kun adverboj (ekz.: kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (Z) ...)

15 Vi rimarkas, kompreneble, ke la ekzemplo estas precize sama kiel tiu en PV, nur ke nun malaperis la vera pluskvamperfekto. Ambaŭ ekzemploj estas Zamenhofaj. Mi ne scias, de kiu fonto venis tiuj ekzemploj, do mi ne povas klarigi la diferencon inter ili. Ĉiukaze, mi havas la impreson ke franclingvanoj ne multe ŝatas la pluskvamperfekton, dum angloj kaj germanoj estus tre surprizitaj, se oni informus ilin, ke tiu tempo ne ekzistas en Esperanto. Cetere, se oni rigardas en PIV sub esti, difino n-ro 6, oni trovas tie belegan ekzemplon de pura pluskvamperfekto, el la londona traduko de la Malnova Testamento: 6 Verbo uzata por formi la kunmetitajn tempojn: ... kiam Boaz estis manĝinta, li iris por kuŝiĝi.

ROLO DE LA VORTARISTO

Kio estas la rolo de vortaristo, kiu kompilas vortaron en Esperanto? Ĉu li aŭ ŝi simple registru ĉion trovitan, aŭ ĉu necesas mem interveni por decidi ĉu difinita uzo taŭgas aŭ ne? Certe en la naciaj lingvoj la celo ĝenerale estas registri la aktualan uzadon. Sed en Esperanto, la tasko estas pli komplika. Ĉar Esperanto estas nur la dua, lernita lingvo por la plejmulto da parolantoj, multaj homoj eraras, aŭ estas tro influataj de sia nacia lingvo: ekzemple ofte okazas ke nesperta parolanto neintence prenas vorton el la propra lingvo, kredante ke ĝi ekzistas ankaŭ en Esperanto. Tial okazas, ekzemple ke komencanto (kaj bedaŭrinde foje ankaŭ nekomencantoj) uzas la vorton zero anstataŭ nulo. Esperanta vortaristo evidente devas rekoni kaj ne akcepti tiajn erarojn.

Bedaŭrinde, tamen, en PIV estas registritaj amasoj da vortoj, kiuj ŝajnas al mi ekstreme dubindaj. Oni trovas en ĝi ekzemple la vortojn eosto kaj uesto (oriento kaj okcidento). Tiuj, laŭ mi estas neuzataj kaj absolute ne devus havi lokon en Esperanta vortaro. Sed jen ili, sen eĉ la averto "evitinda", kiu troviĝas apud la tute respektindaj vortoj razeno kaj gajni (en la senco "perlabori"). Eosto estas sekvata per la simbolo por neologismo, sed uesto ial ne. Esperantaj poetoj ŝajne opinias, ke ili rajtas laŭdezire inventi novajn vortojn, sekve en PIV oni trovas la neologismojn traŭbo kaj uvo por "vinberoj". Neniu povas malhelpi poetojn fari tion, sed ĉu estas ĝuste tuj aldoni tiajn inventaĵojn al la vortaro? Eĉ en la angla vortaro oni ne trovas tiom da sinonimoj por tiu

16

frukto. Kaj Zamenhof ja deziris, ke Esperanto estu pli facile lernebla ol la naciaj lingvoj, ĉu ne?

ĈU ERAROJ EN PIV?

En PIV estas registritaj ne nur nenecesaj neologismoj, sed ankaŭ simplaj eraroj. Unu tia, supozeble, estas jaspiso. En PV oni trovas jaspo: "malmola kaj nediafano ŝtono, simila al agato, havanta multkolorajn striojn kaj makulojn". PIV ja enhavas la vorton jaspo, sed tuj poste troviĝas ankaŭ jaspiso kun la sama signifo. La problemo estas, ke ĝi estis uzita en la londona Malnova Testamento, kaj konsiderante la fakton ke temas pri tiel grava kaj vaste konata verko, efektive necesas registri ĝin. Ĉi tiu estas kazo, kie oni ja povus aldoni la averton "evitinda" ... sed tio ne aperas.

Alia ekzemplo, kiu verŝajne temas pri eraro, estas peroneo. En PIV ĝi aperas kun la indiko "= fibulo" (en la anatomia senco; ne temas pri la pinglo!). Oni certe ne bezonas sinonimon por tiu apenaŭ konata osto. Do, kial en PIV aperas du vortoj por tiu koncepto? Denove por la respondo, ni devas iri al la franca vortaro. Tiu osto en la franca nomiĝas péroné. Mi povas imagi, ke iu franca esperantisto, ne sciante ke la ĝusta vorto en Esperanto estas fibulo, iam preterintence kreis la novan vorton peroneo. Sed ĉu tio estas sufiĉa kialo por aldoni la vorton al la vortaro?

Fakte ŝajnas al mi, ke Waringhien intervenas ĝuste kiam tio ne necesas; sed kiam interveno efektive utilas, li registras eĉ la plej dubindajn kreaĵojn senkomente.

La ekzemploj, kiujn mi donis en ĉi tiu parolado, estas tiuj, kiujn mi mem nur hazarde trovis. Certe, se oni sisteme ekzamenus kaj komparus la du vortarojn, oni trovus multajn aliajn malsamecojn. Noto: La supraj ekzemploj estas tiuj, kiujn mi diskutis dum la prelego en Frascati. Ĉi-sube mi listigas kelkajn aliajn vortojn, kiuj estas malsame traktitaj en PV kaj en PIV. Legantoj povos mem rigardi kaj kompari la difinojn en la du vortaroj. Mi volonte ricevos informojn ankaŭ pri aliaj vortoj malsame traktitaj en la du vortaroj.

Agnoski Laŭ PIV havas nur juran signifon. La unua difino en PV estas pli ĝenerala.

Agiti La unua difino laŭ PV iĝas la tria laŭ PIV, kun pli limigita senco.

Staplo Tute malsamaj difinoj en la du vortaroj.

Flagri Kvare difino laŭ PV mankas en PIV.

Paniko Laŭ PIV, sed ne laŭ PV, temas nur pri kolektiva teruro.

Tabelo, tabulo Granda konfuzo inter tiuj du vortoj en PIV. Multe pli klara distingo en PV. (Cetere,

temas pri Fundamentaj vortoj. Ĉu ne estis klara difino jam en Universala Vortaro?)

Perversa, perversio PV enhavas nur la unuan. PIV kreas la novan radikon perversio, al kiu ĝi donas parton de la signifokampo.

Traŭmo, traŭmato La unua aperas en la suplemento de PV. PIV enterigas ĝin, kaj havas nur la duan. Mi kredas, ke la plejmulto da parolantoj verŝajne ja preferas la pli simplan (PV-an) formon.

Kardio, kardjo Laŭ PV, kardio rilatas al la stomako. Laŭ PIV, temas pri la koro, dum por la stomako ĝi donas kardjo.

Ingredienco, ingrediente En PV troviĝas nur la unua. Waringhien estis devigata aperigi ĝin en PIV, ĉar ĝi estis aprobita de la Akademio, sed li ne povas rezisti komenti, ke "ingrediente estus la ĝusta formo".

Kapsiko, papriko Laŭ PV, la unua estas la legomo, la dua estas la spicaĵo farita el ties semoj. Laŭ PIV, ambaŭ nomiĝas papriko (kiaj eblecoj por konfuzo en receptoj!).

Anna Löwenstein, akademiano, permesis publikadon de tiu artikolo kun rimarko ke ĝi havas kelkajn jarojn kaj koncernas antaŭajn versiojn de menciitaj vortaroj.

Saluton Sinjoro Redaktoro: Interesa enhavo mi trovis en "Aktuala 04/2010". Permesu rimarkon pri paĝo 19, pri "hibou". Kiam antaŭ 2 aŭ 3 jarojn aperis tiun bestareton, mi jam atentigis la eldoniston pri erara traduko. Bonan vesperon,

Maurice Wouters, membro de EBG, eo.wm.5520 @ skynet.be

Imagier, komento

Hibou = otuso troviĝas en PIV, sed ĝenerale oni uzas « strigo »

Poŝtelefono = téléphone « mobile » (eĉ en Nederlando)

** « portable » estas laŭparoliilo, malkroĉe

de via fiksa aparato, kaj trans »porti » ene de via domo

Por informo : ŝtuparo, en la nederlanda vortaro ekzistas « stoep

(prononco : stup) = seuil de porte, domoj en urboj posedis,

plejparte antaŭ, la enirpordon, ŝtonan ŝtuperon

« lavabo » en klasika Eo = lavpelvo

« klozet » ** = nefĉesejo

« judo » laŭ PIV = nomo de gento, la japandevena sporto = ĵudo

« soldat de plomb » = stana soldato

Kion mencias la vortaroj ?

Etimologia vortaro 5 vol :

« strigo » = latindevena « strix » / strigis »

« otuso » NE menciita

Dico Pratique, du direkta :

« hibou » = strigo

« otuso » NE menciita

Plena Vortaro :

nur strigo

malestas otuso

Etimologia Vortareto Pragmata de Eo

strigo

otuso = uzata de omitologoj por indiki genro / speco

KONFERENCO EN EŬROPA PARLAMENTO

Lingva Diverseco : Defio por Eŭropo
Jaudon, 4-an Marto 2010 9h30-17h00

La konferenco estis organizata de la Alianco Liberaloj/Verduloj kaj mi decidis partopreni pro la alvoko en la Jahu diskutlisto [Esperanto-en-lernejojn] lanĉita de D-ro Lajos Molnar, Germain Pirlot, Zlatko Tislar kaj aliaj.

Sean O'Riain, Prezidanto de EEU kaj mi mem, ni decidis dividi nian ĉeestadon, mi matene kaj li posttagmeze. Sed bedaŭrinde (aŭ eble ĝuste ne) Sean anstataŭ devis partopreni dum la tutan tagon al iu prelego de Prof. Grin, kiun la esperantistaro sufiĉe bone konas pere de lia fama "Raporto Grin", kies konferenco estis organizata de la tradukservo de la Eŭropa Komisiono kie Sean laboras kaj devis verki raporton.

Mi bedaŭrinde nur povis ĉeesti dum la parto 1 de la konferenco, kaj la du unuaj eroj de la parto 2, kaj dum la konkludoj vesperaj, ĉar mi ankaŭ devis partopreni al alia posttagmeza kunveno alialoĝa en Bruselo.

Komence la Konferenco konstataj kaj demandas sin: Eŭropo posedas riĉan, kulturalan diversecon, de kiu ĝi estas heredanto, sekve: Ĉu ni povas permesi ke la historiaj eŭropaj lingvoj estu malbone zorgataj kaj superfortigataj fare de la EU instuticioj? Ĉu ni povas akcepti ke tiu-ĉi neanstataŭigebla heredaĵo, kies lingvoj ofte estas minacataj, malaperu en la estonteco? Ĉu ni povas toleri ke la popoloj de la EU estu neataj iliajn rajtojn koncerne la propra lingvo? La tri partoj de la konferenco sinsekvas al tiuj demandoj:

Parto 1 - Lingvoj sen ŝtato: politiko pri plurlingveco de la Eŭropaj Instuticioj ĉefe ekzemple simbole de la lingvo kataluna (Hispanujo, Andoro), sed ankaŭ pri la kimra (Kimrujo), la galega (Galegujo) kaj la eŭska/vaska (Eŭskujo en norda Hispanujo kaj suda Francujo). Por la kataluna, kun pli ol 10 milionoj da parolantoj ene en la EU, la konferenco postulas la rekonon kiel oficiala lingvo de la EU. Laŭ Kolja Bienert de Horitzó, sufiĉus ke la Hispana estraro enkondukas la akceptpriparoladon apud la kompetentaj EU Instuticioj.

Parto 2 - Minoritataj Lingvoj en la Membroj Ŝtatoj. Estas lingvoj kiuj estas minacataj pri estingiĝo kiel la korsika (Korsika insulo), la bretona (Bretonujo), la okcitana-provenca (Okcitanjo), la sarda (Sarda insulo), la friula (norda Italujo), la frisa (norda Nederlando, Germanio) kaj aliaj malpli bone konataj lingvoj.

Parto 3 - Protekti lingvan diversecon kontraŭ subpremado. La kazoj de la Hungara minoritato en

17
Slovakujo, Rumanujo, Serbujo kaj de la Germana minoritato en Ĉeĥujo. Ankaŭ de la rusparolanta loĝantaro en Estonujo kaj Latvujo.

La Alianco Liberaloj/Verduloj nun volas provoki reagojn kaj konsciiĝo en la EP. Tiu estis la celo de tiu-ĉi konferenco.

Personaj rimarkoj:

Ĉeestis pli ol 135 homoj en la salono, multaj el Katalunujo, kaj 12 ĵurnalistoj, inter ili Dafydd ab Iago, esperantisto de la jaro 2003, iama Direktoro de la BKC (Brusela KomunikadCentro). Neniam esperanto estis menciata, sed tiu tute ne estas mirige, ĉu ne? Cetere ne estis la temo. Oni tamen povas demandi sin kien tio nin kondukos: jam nun ni havas en la 27 EU landoj 23 oficialajn lingvojn kaj en la salonoj de la EU instuticioj jam nun ne ekzistas sufiĉaj kabinoj por ĉiuj enterpretistoj! ... Kompreneble oni devas fari klaran distingon inter la bezonoj de la loĝantaro de la EU kaj de la EU instuticioj. Gravas ke la lingvaj rajtoj de la homoj estu respektataj. Mi volis meti demandon dum la debato post la 1-a parto sed la Prezidanto ĝus malfermis la diskuton (pro tio mi ĉiam klopodas starigi la unuan demandon sed tiu ne ĉiam funkcias) kaj kiel ĉiam tempo mankis.

Pri prelego "Analizo de la konvencio inter la Hispana Estraro kaj la EU instuticioj koncerne la uzo de la Kataluna lingvo". Estis bela prezentado "powerpoint" kaj Bienert impresis min ĉar li flue parolis en ca, es, fr, nl kaj prelegis kompreneble en la angla, la alia internacia lingvo. Dum la unua kafo-paŭzo kaj vespere post la konkludoj kaj dum la akcepto mi havis la eblecon paroli kun pluraj homoj kaj mi ne forgesis menci la granda valoro de la programmo "Springboard/ Lingvolanĉilo". Do, pri la uzo de Esperanto por plifortigi plurlingvecon kaj plibonigi la studadon de lingvoj ĝenerale. Multaj pretas akcepti tion, sed – kiel diris Sean - se ni pli ol tio postulas, ili tuj fermas la orelojn. Pli bone estas fakte nenion diri ol postuli tro! Mi preparis do iom da varbiloj kaj disdonis ilin al miaj konversaciopartneroj kaj lasis kelkajn ekzemplerojn en la poŝtĉekoj apud la enirejo de la salono. Poste mi konstatis ke nur kelkaj restis. Estas ĉiam bone doni al la homoj la retadresojn: www.springboard2languages.org kaj www.europeo.eu. Mi havas la eblecon paroli kun sekvantaj homoj: Dafydd ab Iago, malnova amiko mia kaj gazetisto kiu verkis inter alie por Herald de Esperanto; S-rino Milvia Soubounou de la "British Council"; S-ro Syd Morgan de la "Kimra Nacia Fondaĵo - Welsh Nationalism Foundation" – Sefydliad Cenedlaetholdeb Cymreig, edzo de Jill Evans MEP; Nelly Maes (SLP - Belgio) eks-MEP mia samlandana. Do por mi estis fruktodona tago, sed ne nepre por Esperanto. Tamen mi klopodis kaj iomete sukcesis paroli kun la homoj pri niaj idealoj!

Raporto de Remy Sproelants, membro de EBG

18

LIBROJ DE 2009

Dum 2009 la Libroservo de UEA vendis sume por 113 298,47 EŬR, t.e. je 11 809,15 EŬR (9,4%) malpli ol en 2008 (125 107,62). La malkreskon ĉefe klarigas fenomeno konata el membrostatistikoj, "kongresa efiko": en 2008 dum la Roterdama UK la vendoj sumiĝis je 40 504 EŬR, sed en Bjalistoko same multe da kongresanoj butikumis por 29 000 EŬR (-11 504). Entute la Libroservo vendis 15049 unuopajn librojn aŭ aliajn varojn (13707 en 2008). La nombro de venditaĵo titoloj estis praktike sama: 2560 anstataŭ 2554 en 2008. Ĉar UEA stokas ĉ. 5500 titolojn, iom pli ol duono el ili do allogis neniu aĉetadon dum la tuta jaro. Ankau la nombro de klientoj apenaŭ ŝanĝiĝis: 653 anstataŭ 662. La Libroservo plenumis 1620 mendojn; averaĝa kliento mendis do 2,5-foje.

Vendoj entute (nombro, titolo, aŭtoro, prezo €):

392 Poŝamiko (B. Allée & K. Kovats) 5,10
213 Ĉu vi parolas tendare? (R. Corsetti, M. La Torre)* 4,80
179 Vojaĝo en Esperanto-lando (B. Kolker)* 18,00
167 Esperanto de nivelo al nivelo (M. Kovács k.a.) 10,50
121 Pocket Esperanto Dictionary (A. McLinen)* 15,00
112 Monumente pri Esperanto (H.Röllinger)* 7,50
106 Utila Estas Aliĝo (U. Lins)* 15,00
100 Vivo de Zamenhof (E. Privat)* 9,00
91 Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA* 4,50
88 Konkiza klarigo pri la landnomoj en E-o (A. Löwenstein) 0,90
78 Internacia Kongresa Universitato 2009 (Red. J.A. Vergara)* 15,00
65 Faktoj kaj fantazioj (M. Boulton)* 13,80
63 Saluton! (A. Childs-Mee)* 10,80
62 Naturaj vortordoj en Esperanto (Wim Jansen)* 4,50
61 Elektitaj paroladoj kaj prelegoj (I. Lapenna)* 9,90
61 Konkiza etimologia vortaro (A. Cherpillod)* 21,60
61 Ŝlosilo angla (A Key to Esperanto) 0,60
58 Homarano (A. Korĵenkov) 27,00
58 La Zamenhof-strato (R. Dobrzynski) 18,00
53 Malkovru Esperanton (E@I) 1,50
53 Komputeko (Y. Nevelsteen) 6,00

Vendoj unuekzempleraj:
51 Esperanto de nivelo al nivelo (M. Kovács) 10,50
39 Utila Estas Aliĝo (U. Lins)* 15,00
30 Morto de artisto (A. Löwenstein) 18,90
30 Vojaĝo en Esperanto-lando (B. Kolker)* 18,00
28 Beletra Almanako 4 9,90
27 La Asocio (Z. van Dijk) 22,80
25 Homarano (A. Korĵenkov) 27,00
25 Plena ilustrita vortaro de Esperanto 90,00
23 La origino de specioj (K. Darvino) 22,80
23 Pasporta Servo, listo de gastigantoj* 15,00
22 Beletra Almanako 6 9,90
22 Concise Encyclopedia, Original Literature of E-o (G. Sutton) 48,00
21 Konkiza klarigo pri la landnomoj en E-o (A. Löwenstein) 0,90
21 Plena manlibro de Esperanta gramatiko (B Wennergren) 27,90
20 Esperanto estas... (dvd) 4,50
20 Naturaj vortordoj en Esperanto (Wim Jansen) 4,50
19 Esperanto Mini-Course 1,50
18 Beletra Almanako 5 9,90
17 Konkiza etimologia vortaro (A. Cherpillod) 21,60
16 La ŝtona urbo (A. Löwenstein) 22,80
16 Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA* 4,50

* eldonaĵoj de UEA/TEJO Gazetaraj Komunikoj de UEA

L'ESPÉRANTO DE A À Z

EBG aĉetis, je rabata prezo, kelkajn ekzemplerojn de la interesaj, por franclingvanoj, lastaj libroj de André Cherpillod: L'espéranto de A à Z: 5 € (tout en français) ; Les outils grammaticaux de l'espéranto : 15 € (explications en français avec exemples en français et espéranto) la libroj estas akireblaj dum la merkredaj semajnaj kunvenoj. Hélène Falk-Bracke

PRÉAMBULE DE "L'ESPÉRANTO DE A À Z"

En présence du phénomène espéranto, il y a plusieurs attitudes.

- Certains, dont le principal mérite est de ne rien connaître à la question, affirment sur un ton doctoral et sans réplique que l'espéranto est « artificiel, inventé de toutes pièces » et qu'il est donc très inférieur aux langues que l'on décore fièrement de l'épithète « naturelles ». Comme leur opinion est immuable et ne résulte nullement d'une étude préalable de la question, ils ne sont à aucun degré perméables au raisonnement. A tout argument, ils répondront par un cliché glané n'importe où, le plus souvent de la plus désolante stupidité.

Ce livre ne s'adresse pas à eux, puisqu'ils ne voudraient pour rien au monde, renoncer à leur chère ignorance.

- D'autres, dont les hautes fonctions exigent qu'ils manient avec dextérité la langue de Wall Street, et qui, à l'étranger, ne fréquentent que leurs homologues, ne voient aucunement la nécessité d'une langue internationale neutre, par la faute de laquelle serait mise en péril la dictature d'une langue unique étendant ses tentacules sur la planète entière et grâce à laquelle ils détiennent une grande partie de leur pouvoir.

Ce livre ne s'adresse pas à eux non plus, c'est évident.


- D'autres encore, ayant entendu dire qu'il existe une langue internationale qui peut être apprise en quelques mois, pour peu qu'on s'en donne la peine et qui permet de communiquer sur un pied d'égalité avec tout être humain ayant appris la même langue, avec aussi peu d'efforts, sous quelque latitude qu'il soit né, vont se précipiter vers le cours d'espéranto le plus proche de leur domicile, ou bien apprendre la langue internationale par Internet, ou par la méthode Assimil. C'est agir fort sagement.

Eventuellement, ce livre s'adresse à eux, car ils se posent peut-être encore de nombreuses questions pratiques ou linguistiques sur l'espéranto et son fonctionnement.

- Pour finir, certains n'ont pas envie, ou pas le goût, ou pas le temps d'apprendre l'espéranto, pour des raisons qui ne regardent qu'eux. Mais leur curiosité est aiguisée par le phénomène espéranto, que jusqu' alors ils ne connaissaient pas (au mieux, ils avaient entendu le mot espéranto, sans rien savoir de la réalité qu'il recouvre), et ils désirent fort honnêtement se renseigner à une source autorisée.

C'est essentiellement à eux que ce livre s'adresse.

André Cherpillod et l'édition La Blanchetière, 2009



Bildoj de sportoj, hejmaj bestoj kaj partoj de homa korpo



Membro kaj kunorganizantino de Zamenhof-festoj de Esperantista Brusela Grupo